



## Transponta Kongreso (germana-pola-fervojista): kvara informilo Nova dato: 21.-24.05.2021 en Frankfurt (Oder) kaj Słubice

### Planado sub pandemiaj kondiĉoj

Planado fariĝis malfacila. Kiam ni dissendis la trian informilon en aprilo 2020, ni supozis esti relative sekuraj ŝovante la kongreson je unu jaro al Pentekosto 2021. Nun (fine de februaro 2021) certas nur ke sub la nunaj reguloj validaj en Germanio kaj Pollando ĝi ne povus okazi. Ni havas ankoraŭ preskaŭ tri monatojn. Komenciĝis vakcinado. La partneraj asocioj (PEA, GEA kaj IFEF) tial decidis rekomenci la planadon por ĉeesta kongreso en la du urboj ambaŭflanke de la rivero Oder. Samtempe ni antaŭvidas partan virtualigon, do „hibridan“ kongreson. Eblos kontribui per reta ligo, kaj eblos rete sekvi almenaŭ parton de la programo. IFEF krome decidis rezigni pri la origine planitaj plilongigaj tagoj de lundo ĝis vendredo kaj pri kelkaj belaj ekskursoj. La tri asocioj do planas kongresi paralele je la supre menciitaj datoj.

### Aliĝoj kaj kotizoj

Por la origine planita kongreso GEA, PEA kaj IFEF jam ricevis entute ĉ. 160 aliĝojn, multajn el ili kun antaŭpago. Kiel anoncite tiuj aliĝoj restas validaj por 2021. La ricevitaj pagoj eniros la buĝeton de la nuna kongreso. Se ni nun devos nuligi la ĉeestan kongreson pro pandemiaj malpermesoj kaj se vi ne donas alian instrukcion, vi ricevos vian monon. Validas jenaj tarifoj (por A- kaj B-landoj ni uzas la difinojn de UEA):

Partoprenantoj el A-landoj (kiel Germanio):	plena tarifo 60,00 €,	reduktita tarifo 30,00 €
Partoprenantoj el B-landoj (kiel Pollando):	plena tarifo 45,00 €,	reduktita tarifo 25,00 €

La reduktita tarifo validas por akompanantoj, handikapuloj, junuloj kaj personoj sen enspezoj. Nemembroj de GEA loĝantaj en Germanio pagos aldonan kotizon de 30,00 €. Aliĝintoj el 2019/2020 por la IFEF-kongreso ricevos tiun parton de la kotizo, kiu estus kovrinta la plilongigajn tagojn. Reta partopreno estos senpaga, sed postulos aliĝon por ricevi alirkodon

### Programo, kongresejo, loĝado - aŭ kompleta virtualigo

La ĉefa temo restos “najbaroj”. Jam pasintjare multaj kontribuantoj indikis ke ili estos disponeblaj ankaŭ en 2021, kaj kelkaj tion jam rekonfirmis. Ekz-e Ulrich Lins prelegos pri la historio de Esperanto-rilatoj inter Pollando kaj Germanio, Seán Ó Riain pri najbaraj rilatoj sur la irlanda insulo, kaj Amri Wandel denove organizos SUS-studsesion kun diversaj prelegoj. La inaŭgura kunveno okazos sabaton, la 22-an de majo antaŭtagmeze. Sabaton kaj dimanĉon posttagmeze ni ofertos ekskursojn (pri kiuj ni esperas informi en aprilo) kaj paralelan laborprogramon. La programo daŭros ĝis pentekosta lundo tagmeze.

Ni estas en kontakto kun Kleist-Forum en Frankfurt (Oder) kaj Collegium Polonicum en Słubice, kiuj disponas pri taŭgaj kunvenejoj kaj estas liberaj je la koncerna tempo. Iliaj definitivaj konfirmoj tamen dependos de la koronavirusa situacio kaj venos ne antaŭ aprilo. En tiu momento ni devos do rapide decidi ĉu organizi la kongreson aŭ nuligi kaj laŭeble anstataŭi ĝin per komplete virtuala programo.

Ni klopodos denove interkonsenti kun la administracio de la studentaj domoj en Słubice por ebligi favorprezan loĝadon. Pro la samaj kaŭzoj konfirmo povos daŭri ĝis aprilo. Aliajn ĉambrojn peras la komuna turisma oficejo de ambaŭ urboj ([info@tourismus-ffo.de](mailto:info@tourismus-ffo.de), telefono +49 335 6100800). Hoteloj ambaŭflanke de la rivero estas facile troveblaj en la reto.